

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Kongresa emblemo estas fiksita por nia kongreso!



Jokohama 2017

La 104-a Japana
Esperanto-Kongreso

La Jar-kajero de Neprofitocela Organizo Esperanto Jokohama (NEJ) en 2016

Sibayama Zyun'iti

Nia organizo, kun pluraj lernoklasoj, havas preskaŭ ĉiumonate "Hama-Rondan Vesperon" (HRV), en kiu oni aŭskultas prelegon de membroj aŭ gastoj. Ni listigas HRV kaj kelkajn aliajn eventojn.

(Mallongigo por la kunvenejoj)

[KK]: nia Kutima Kunvenejo, nome Gubernia Kunven-Centro [Kanagawa Kenmin Sentaa] en Jokohama.

*jan. (meze): Eldonis kolorplenan version de "Novaĵoj Tamtamas", n-ro 311.

*jan. 31 [KK] La 2-a Jarkunveno de la rondo por buĝeto, planado, estraro ktp. Ĉeestis 16 personoj kaj estis 26 mandatoj. Post la oficialaj aferoj, s-ino Doi Ĉieko parolis pri s-ro Kubo Sadaziroo, bildokritikisto kaj iama honora prezidanto de Japana Esperanto-Instituto, kies naskodomon (nun uzatan kiel muzeon) ŝi vizitis.

*feb. 7 [Ĉambro en la domo de JICA] Kadre de Jokohama Internacia Forumo, nia rondo havis 2-horan prelegon pri Esperanto (historio, nuna stato kaj kurseto), kun 17 aŭskultantoj.

*feb. 20 [KK] Hama-Ronda Vespero: pri Slovakio, la kongreslando de la 101-a Universala Kongreso, kun 19 partoprenintoj. Doi Ĉieko prezentis slovakon E-movadon, kaj Doi Hirokaz prezentis la landon, utiligante i.a. materialon pruntitan de la en-japana slovak ambasadorejo.

*mar. 5 [KK] 102-a Legokunsido pri "Mara Stelo" de Julian Modest.

*mar. 12,13 [KK] Ekspozicio ĉe Foiro de civitanaj agadoj, de la grupoj, kiuj uzas KK kiel kunsidejon.

*mar. 19 [KK] Hama-Ronda Vespero: prelegis s-ro Kijonaga Ĵoota sub la temo "Polenoj sub tero rakontas", kun 12 aŭskultantoj.

*apr. 3 Ekskurso al la urboj Mooka kaj Maŝiko per 11 partoprenantoj. En Mooka estas la muzeo de Kubo Sadaziroo (Vidu komenton en jan. 31).

*apr. 16 [KK] Hama-Ronda Vespero: Prezento pri Esperanto: Rea prezento de personoj, kiuj lastatempe prezentis la lingvon al la publiko. Parolis Takahasi Kimiko, Fuse Kentarou, Miyazaki Hideko kaj Nanba Fumiharu. 12

partoprenantoj.

- *maj. 21 [KK] Hama-Ronda Vespero: kun la temo “Artefaritaj lingvoj, diference de Esperanto”, Nanba Fumiharu prezentis novajn provojn, Sibayama Zyun’iti - Solresol, kaj gastopreleganto Niftig pri lojban [loĝban]. 12 partoprenantoj.
- *jun. 1: Eldonita estas “La Orpantalono” en paralela traduko Esperanto-japana. La japana traduko estis farita de Ohguro Yukiko.
- *jun. 4 [KK] 103-a Legokunsido pri “Tamen ĝi moviĝas”, esearo pri Esperanto-movado.
- *jul. 23 [KK] Komuna lernado, i.a. per “skeĉo kun suflorado”, iniciatita de Aihara Misako.
- *jul. 23 [Nitro en Slovakio] Ĉe Movada Foiro en la 101-a UK, ni prezentis nin antaŭ la kongresanoj en la Movada Foiro.
- *aŭg. 22-24 [KK] La 3-a Fotoekspozicio kaj la ekspozicio pri “Nia Unua Lernolibro”, t.e. unuagrada lernolibroj elementlernejaj pri la nacia lingvo, kolektitaj pere de esperantistoj.
- *sept. 3 [KK] Prezento pri someraj spertoj. 11 personoj (inkluzive de bulgaro Angel Ivanov) rakontis sian someran sperton en Esperanto.
- *sept. 10 [KK] 104-a Legokunsido pri “Tri rakontoj pri la miljara paco” de John Francis.
- *okt. 8,9 [Parko Grand Mall en Minato-Mirai] En la Internacia Festeno de Jokohamo, nia rondo

havis ekspozician tendon.

- *okt. 8-10 [Urbo Oumihaĉiman] Okaze de la 103-a Japana Esperanto-Kongreso, nia rondo havis standon, kaj varbis por la venontjara kongreso en nia urbo.
- *nov. 1 [Kangawa Rodo Plaza, Placo por Laboroficoj de Gubernio Kanagawa] Ni oficiale rezervis la kongresejon de la venontjara 104-a Japana Esperanto-Kongreso en tiu ĉi loko.
- *nov. 19 [KK] Hama-Ronda Vespero: pri la 104-a Japana Esperanto-Kongreso, okazonta de la 3a ĝis la 5a de novembro 2017.
- *dec. 3 [KK] 105-a Legokunsido pri “Rakontoj Prapatraj pri nia Lando antaŭ multaj jarcentoj” de Doko.
- *dec. 18 [Civitana centro UMECO en Odawara] la 46-a Zamenhof-Festo de Kanagawa. Gastparolis Huzimaki Ken’iti. Salutis i.a. Ulrich Lins. 53 personoj kunsidis.

Niaj Planoj

- *jan. 29 [Kangawa Rodo Plaza] 3-a Ĝenerala Kunsido de la NPO
- *feb. 5 [ĉambro en la domo de JICA] Kadre de Jokohama Internacia Forumo, nia rondo havos prelegon pri Esperanto.

La 46-a Zamenhof-Festo en Odawara

Sibayama Zyun’iti


En la 18a de decembro, 4 Esperanto-grupoj de nia Gubernio Kanagawa havis komunan Zamenhof-Feston en Odawara, en ties relative nove konstruita centro por civitanaj agadoj.

Post la malfermo je 13:00, prelegis s-ro Huzimaki Ken’iti, konata korespond-kursa instruisto pri nia lingvo, pri la maniero transalti baron (aŭ valon) inter komencantoj kaj mezniveluloj. Sekvis salutoj, kaj je nia surprizo, s-ro Ulrich Lins, konata esperantologo, aŭdigis sian voĉon – li tute hazarde ekskursis en Odawara kaj trovis verdstelan flagon tra la fenestro de nia kunvenejo. Sekvis kantogvidado de s-ro Makino Micuo, prezento pri la UK en Slovakio de s-ro Suzuki Keiichiro, pri la Japana Kongreso en Oumihaĉiman de s-ro Nanba

Fumiharu. Esperantaj libroj estis prezentitaj de s-ino Doi Ĉieko kaj poste vendataj en stando. La 4 grupoj prezentis sin, kaj la kongresa flago estis transdonita al la membro de la grupo en Kawasaki, kiu organizos la 47-an Zamenhof-Feston en sia urbo en 2017.



s-ro Huzimaki



s-ro Lins

105a Legokunsido

En la 3a de decembro, ni havis la 105an Legokunsidon por "Rakontoj Prapatraj pri nia Lando antaŭ multaj jarcentoj" de Doko. Partoprenis ses personoj.

Magiaj legendoj pri nia lingvo

Mizro Iwaya

Multaj landoj, inkluzive de Japanio, havas diversajn legendojn kaj mitojn. Esperanto ne havas longan historion kaj ne havas antikvan legendon tiuspecan. Sed ĉi tie aperis novaj legendoj pri la historio ne nia lingvo.

"Alico en mirlando" estis verkita de Lewis Carroll. La aŭtoro provverkis ĝin kaj legis al siaj filinoj. Post atenta sondado de ilia reago, li reverkis kaj poluris la enhavon. Ankaŭ ĉi tie la aŭtoro de "Rakontoj Prapatraj" diris ke li ofte deklamis la verkon antaŭ la aŭskultantoj kaj poluris ĝin. Ambaŭ rezultoj estas same brilaj.

En la libro abundas prahistorietoj de lingvo Esperanto. Ekzemple, pri la korelativaj vortoj, antaŭ multaj jaroj ekzistis:

Reĝo Kiko ĉiam demandadis "Kio...

Respondisto Tito ĉiam respondadis "Tio ...

Filino Nenjo fakte ne ekzistis.

Filino Injo estis amata de iuj.

Filino Ĉinjo estis tre amataj de ĉiuj.

Tiamaniere decidiĝis en nia lingvo korelativaj vortoj: kio, tio, nenio, io, ĉio...

Ekzistas en la libro sume 12 epizodoj tiaj, kaj gvidas nin al la historio de formiĝo de Esperanto. La legantoj povas ridi pri la spriteco aŭ grimaci pri la senceco. Libere ĝuu!

Falsloro aŭ Kial-rakontoj pri Esperanto

– "Rakontoj Prapatraj ... " de Doko –

Sibayama Zyun'iti

En la mondo estas multaj rakontoj, kiuj klarigas "kial nun tiel estas la mondo", ekzemple, kial hundo flaras manĝaĵon (Novaĵoj Tamtamas n-ro 314). La nun temata libro kun la plena nomo "Rakontoj Prapatraj pri Nia Lando Antaŭ Multaj Jarcentoj Kiam Okazemis Aferoj Mirindaj", estas unu el tiaj tiel nomataj kial-rakontoj. Kaj klarigita estas la origino de bazaj vortoprovizoj Esperantaj: kial sufikso -eg-

funkcias kiel vorteto por signi grandecon, kial la 5 komencoj de la tabel-vortoj estas "ki-, ti-, i-, ĉi-, neni-" ktp.

La kial-rakonto pri "-eg-" komenciĝas de ia fortega junulo nomata Knaĥoĥŝveŭpsceg (sen klarigi, kial estas tiel nomata), kion prononci princinoj, nome edzin-kandidatinoj ne povis. Nek Ĥoĥŝveŭpsceg, nek Ĥoĥŝvo, nek Ŝveŭpco nek ... kaj fine oni venis ĝis Eg, kies esenco estas fort-eg-a. En tiu ĉi estas falsorakonto, ni ridetu, aŭdante ke la bardo nomata Doko estas usonano. En la usona (t.e. angla) lingvo estas konsonanto-sekvo "kn" sed ties "k" neniam estas prononcata, ekzemple "knave" estas "nejv", kion germanoj facile prononcas. Ankaŭ la konsonanto "ĥ" estas fremda. Cetere, Ŝveŭpco ŝajne aludas al var-marko de sodakvaj trinkaĵoj nomata Schweppes [ŝveps], troveblaj ankaŭ usone.

Ni legis antaŭ 3 monatoj "Tri rakontoj pri la miljara Paco" de John Francis (Novaĵoj Tamtamas n-ro 319), kaj la rakonta situacio estas iel simila --- Reĝoj regas sian landon, kaj ili zorgas pri sia venonta generacio, nome princoj aŭ princinoj. Dume, Francis verkis novelaron, Doko "falsloron". En ĝi, Reĝlandon Esperantujo ĉirkaŭas Idujo, Volapukujo --- iliaj nomoj estas familiaraj al ĝisostaj esperantistoj. Sed en "Rondiro la Turisto" aperas Loglanujo. Nu, Loglan estas relative nova lingvoprojekto, kiu faris vojon al "lojban" [loĝban], pri kiu nur modernaj esperantistoj konas. Kredeble, Doko estis iel ĝenata de tiu ĉi influo en la moderna usona esperantujo.

La rakontomaniero de Doko certe estas influita de la erudicio de sia profesia specialo, nome etnografio, estante profesoro pri tiu fako en usono per la plena nomo David K. Jordan --- laŭ anglalingva Vikipedio https://en.wikipedia.org/wiki/David_K._Jordan, lia universitata edukado havas bonan reputacion inter la studentoj.



Unika produktaĵo amuzi kaj instrui

– impresoj pri la libro “Rakontoj prapatraj pri nia lando antaŭ multaj jarcentoj kiam okazemis aferoj mirindaj”

AIDA Yayoi

Surbaze de la folkloro stilo David K. Jordan (plumnomo Doko) produktis alispecan folkloron, nomitan “falsloro” laŭ lia klasifiko. Kial ĝi estas falsloro? Ĉar folkloroj kutime kaŝas lecionon aŭ moralon ene de la rakonto, legantoj povas gajni saĝon utilan por ilia vivo, sed tia stimulo ne troviĝas ĉi tie. Pro tio la aŭtoro verŝajne nomis sian folkloron “falsloro”.

Anstataŭ kaŝita leciono aŭ moralo aperas vortelemantoj en la fino de ĉiu rakonto. La spaco por ĝiaj klarigoj estas malgranda sed ludas kompareblan rolon kun tiu de la kaŝita moralo. Traktitaj vortelemantoj estas diversaj, oni ne povas resumi en la simpla kadro. Estas vortoj kiel “mal”, “eg”, “ek”, “eks”, “ig”, “iĝ”, “kun”, “dis”, “fi”, “aĉ” kaj “ki-vortoj”, “ti-vortoj”, “ĉi-vortoj”, “neni-vortoj”, literoj kun supersignoj, literoj forigitaj, kaj tiel plu.

Legantoj konfirmos, ke tiuj vortelemantoj estas elprenitaj el la nomoj de ĉefroluloj aŭ situacioj de la rakontoj. Kaj ili surpriziĝos kiel lerte s-ro Doko fabrikas fabelon kun lingvistiko. Ŝajnas al mi, ke lia eduka pasio konsciigi Esperanton per gramatiko kaj verkista deziro krei ĉarman legaĵon egalas en la graveco. Tiuj du celoj bone konkurencis por plenumi respektivan taskon. Kaj rezulte, ambaŭ sukcesis brave. Tio pruvas enviindan kapablecon de la aŭtoro Doko.

Mi pensas, ke s-ro Doko tediĝis de ortodoksaj lernolibroj konduki Esperantan gramatikon, kaj, ke li volis liberigi ĝin el la kateno al pli ĝoja kaj iusence sofisma kampo.

prova Falsloro de DOKO

Tanigawa Hiroshi

Ĉi tiu rakontetaro de DOKO ŝajnis lia prova Falsloro donacita al nia esperantujo kiu ne havas originalan folkloron. Ĉiu el la 12 drametoj komenciĝas per tipe legendaj formo kaj stilo. Ĉiuj kvazaŭlegenda fabelo enhavas fantastajn mozaikojn entekstante esperantajn vortojn, kaj

finiĝas per la prezentado de “la origino de iaj esperantaj vortoelementoj”, i.a. afiksoj. Estis amuzege.

(1) La Reĝidino Mal

Tio okazis dum la regado de Reĝo Kuni III, nepo de Reĝo Kuni I, kiu savis nian landon de la drakoj en Eŭropo, de gigantoj en Azio, kaj de najbaraj volapukistoj. Reĝo Kuni III ne havis filon. Li havis nur unu filinon kiu estis bela, ĉarma, sprita, ĝentila, eleganta – tute mala. Pro tio neniu junulo kandidatiĝis por edziĝi al la reĝidino Mal. La tronon de Reĝo III, fine heredis lia nevo. Sed la nomo de la reĝidino restas en esperantujo. Oni parolas pri beleco, ĉarmeco, ĝentileco ankaŭ de Mal-e.

(4) La Grafo Usus; Kial Ruĝas Vin’ en Lando Verda

Tio okazis dum la regado de Reĝo Kuni II. Tiutempe la verdlandanoj trinkis verdan vinon, verdan bieron, verdan teon kaj verdan kafon. La Grafo Usus, ĉefministro, ĉefimpostisto de la Verda Lando, naskita en ĝia orienta regiono, prononcis la vokalojn malklare. Li ofte eraris je akuzativo. Okazis, ke pro lia forlaso de la akuzativo lia subulo estis senkapigita. Okazis ankaŭ, ke pro lia maldiligenteco je la administrado pri la impostaj aferoj la reĝa kaso malpleniĝis. Li planis por draste multigi vinimposton, ke ĉiuj vinoj estu ne privataj, sed reĝaj. Li proponis al Reĝo dirante; “Ĉieŭ vin’ devas esti reŭĝa!” Reĝo miskomprenis pro la malbona prononco de Usus. Li dekretis; “Ĉiu vino devas esti ruĝa!” Konsternita Usus kriegis kaj ripetis “Ne, reŭĝa! reŭĝa!” Sed vane. Reĝo Kuni II koleriĝinta fine senkapigis Ususon.

Tiele en nuna Verda Lando oni trinkas ruĝan vinon. kvankam en ĝia orienta regiono oni klare prononcas nun vokalojn, kaj ne forgesas akuzativon. La aŭtoro skribas; Se ĉefministro Us-us parol-us pli klare, en nia kara Esperantujo la vino rest-us verda.

Ĉe la fino mi deziras al la aŭtoro, ke li bonvolu bildigi en la sekvontaj falsloraĵoj okazuntaĵojn en ne-reĝa lando, kie simplaj homoj vivis ekster reĝa dinastio. Talenta verkisto kia DOKO nepre povos vivece prezenti, kiel en la Antikva Verdiĝanta Lando homoj vivis ĝoje kaj malĝoje, komike kaj tragike, verve fervore tuthomece kun plena homeca amo.